

# Gazeto *Andaluzia*


ANDALUZIO PER SI, POR HISPANIO KAJ LA HOMARO

13-a Jarkolekto

\*

Decembro, 1996

N-ro 48



## GAZETO ANDALUZIA

FUNDADA POR D. JOSÉ GARZÓN RUIZ en San Fernando (Cádiz) en 1910.

Órgano oficial de la Asociación Andaluza de Esperanto.

EDITA: Asociación Andaluza de Esperanto. REDACCIÓN: Armengual de la Mota, 33, 4º D, 29007 Málaga. DIRECCIÓN POSTAL: Apartado 864, 29080 Málaga. DEPÓSITO LEGAL: MA-1136/86. IMPRIME: COPICENTRO, Alameda Principal 42, MÁLAGA.

DIRECTOR: Andrés MARTÍN GONZÁLEZ. REDACTORES: José Francisco MARTÍN DEL POZO (Apartado 5184, 29080 Málaga; [delpozo@redestb.es](mailto:delpozo@redestb.es)), José María RODRÍGUEZ HERNÁNDEZ ([joser@lander.es](mailto:joser@lander.es)). COLABORADORES: Giordano MOYA, Luis SERRANO PÉREZ. GRÁFICOS: Fondo informático de AEU.

Efika Esperantismo / 15	3
Beletraj Konkursoj	4
Intervjuo: Rafael Ruiz Criado	5
Niaj ĉarmaj eŭropaj parlamentanoj	7
Recenzo: <i>Vinilkosmo</i>	8
Recenzo: <i>365 tagoj el la Biblio</i>	9
Radioamatora Angulo	10
Traduka Konkurso	11
Poezia angulo	12
$e=mc^2$	13
Esperanto-disko	15
<a href="http://www.redestb.es/personal/delpozo">http://www.redestb.es/personal/delpozo</a>	16
Andaluza Kulturo	17
Esperanto en Bibliotekoj	18
Paĝoj de nia historio	19
Krucvortenigmo	20
Indekso de la jaro 1996	22
Esperanto Aplikata	23

Plia servo de AEU: de nun ĉiaj informoj pri Esperanto kaj pri AEU en Internet. Kaj tuj vi povos legi tie ankaŭ ĉi tiun revuon. Legu la paĝon 16!



## Efika Esperantismo / 15

Pri la moralo aŭ etiko konvenas klarigi la reciprokajn interrilatojn de la devoj kaj la rajtoj. Se tiuj interrilatoj restas konfuzaj la tuta etiko povas aperi kiel arbitra kolekto da sentencoj sen neniu ajn rilato al la reala vivado.

La Universala Deklaracio pri la Homaj Rajtoj malmulte parolas pri devoj. En la Artikolo 29a, unua paragrafo, diras: "Ĉiu havas devojn al la komunumo, en kiu, sole, estas ebla la libera kaj plena disvolviĝo de lia personeco." Nenio plu. Ĉu tiu komunumo estas la urbo en kiu oni vivas? Ĉu ĝi estas la ŝtato al kiu oni apartenas? Ĉu oni havas devojn al la ŝtato en kiu ne estas respektataj la homaj rajtoj? Ĉu tiu komunumo estas la tuta homaro? Ĉu tiuj devoj rilatas la nunajn komunumojn aŭ, ĉu pli gravas la socia evoluo de tiu komunumo, en la estontecon? Neniu detalo klarigas tion.

La Deklaracio de la Homaj Rajtoj havas la karakteron de defendo kontraŭ arbitraj ŝtatoj, kiuj plenigas la historion. En la Artikolo 21a, 3a paragrafo, konsideras, ke "la volo de la popolo estu la bazo de la aŭtoritato de la registaro; ..." Tiu postulato rekte devenas de la Franca Revolucio. Ĝi estis tute nova en la historio, kaj eĉ nun ne regas en ĉiuj ŝtatoj. Ni prefere konsideru, ke tiu paragrafo koncernas ne la pasintecon, sed la nuntempon en rilato al estonteca socio.

La plej antikvaj sentencoj pri konduto estis montrataj en la Mozeaj Tabuloj. Ili pli indikas devojn ol rajtojn: "ne adultu, ne ŝtelu, ne parolu kontraŭ via proksimulo malveran ateston, ne deziru la domon de via proksimulo, ne deziru la edzinon de via proksimulo,..."

Komparante ambaŭ tekstojn, oni klare povas percepti, ke sen la plenumado de tiuj devoj ne povas regi la homaj rajtoj. Kaj tiuj devoj estas individuaj devoj en ĉiuj tempoj kaj cirkonstancoj.

Se ni aktualigas ambaŭ principarojn laŭ vidpunkto de la socia vojo al la estonteco, ni povas konsideri, ke la komunumo en kiu ni vivas estas pli vasta ol la urbo kaj la nacio. La estonteca komunumo jam devos esti la homara. Ni ankaŭ devas agnoski proksimulon ĉiu samtempulo loĝanta sur la tero, kia ajn estu lia raso aŭ ŝtataneco. Pri tiu vidpunkto estas konvene koni la Homaranismon de Zamenhof, kiun li konsideris plifortigitan esperantismon.

Fakte, tiel same la rajtoj kaj la devoj apartenas al la kulturo.





Pro ilia disvolviĝo estis atingita la civilizacia vivado. La antaŭenirado de la civilizacio estas paralela al la konkorda evoluo de la rajtoj kaj la devoj. En la sovaĝeco ne ekzistas rajtoj nek devoj, regas perforto. La ascendo de la sovaĝeco al la civilizacia vivado estis peniga kaj longdaŭra. Tiu penado konsistigas la kernon de la etiko.

Laŭ la unua artikolo de la Homaj Rajtoj: "Ĉiuj homoj estas denaske liberaj kaj egalaj laŭ digno kaj rajtoj. Ili posedas racion kaj konsciencan kaj devus konduki unu al alia en spirito de frateco." Sed ĉio tio restas deziroj kaj revoj se ne estas impulsataj de agoj. Ni fariĝas indaj de tiuj homaj rajtoj se ni reale laboras por ili. Ne povas ekzisti por ni fremduloj, ni ne povas esti indiferentaj al la malsorto de la aliaj, ĉu proksimuloj, ĉu malproksimuloj, ĉar nuntempe jam ne povas ekzisti tia diferenco.

Kiel agadi? Precize tiu agado estas enkorpiĝinta en la Zamenhofa esperantismo. La lingvo Esperanto kiel ilo de interkompreniĝo por la tuta homaro laŭ la humana sento montrita en la himno *La Espero*. Sur tiu fundamenta bazo la homaj rajtoj regos en la tuta mondo kaj la homaro atingos novan superan fazon de civilizacio.

GIORDANO MOYA



## Beletraj Konkursoj

Kiel konite, Nacia Sindikato de Hispanaj Verkistoj kaj Andaluza Esperanto-Unuiĝo organizis la 1an Beletran Tradukan Konkurson *José Rodríguez Huertas*. Bedaŭrinde, la limdato por ĉi tiu revuo estas tro frua por povi informi vin pri la gajnanto (vi ricevos la anoncon per nia venontaj *Monate ĉe Vi*, en januaro, kaj *Gazeto Andaluza*, en marto).

Nun jam ekmarŝas la dua eldono de ĉi tiu konkurso (vidu la regularon sur la paĝo 11). Nur eblas konkursi per tradukoj en la hispanan de originaloj verkitaj en Esperanto. La limtempo de akceptado de la verkoj finiĝos la 31an de oktobro, 1997.

Krome, kaj por unu nura fojo, ni celebros la numeron 50an de *Gazeto Andaluza* per konkurso por originalaĵoj mallongaj, kiuj povos gajni 10000 pesetojn.

Pli da informoj en *GA 47*, ĉe la redaktoro aŭ en la TTT-pagxaro de AEU en la *Interreto*: <http://www.redestb.es/personal/delpozo/>

La limdato por ĉi tiu konkurso estas la 31a de marto, 1997.



## Intervjuo

Ĉifoje ni intervjuis anon de AEU kiu loĝas en Katalunio, samideanon Rafael Ruiz Criado.

*Gazeto Andaluzia:* Vi estas fervojisto. Kia estas via laboro de esperantisto ene de RENFE?

Respondo: Kvankam antaŭlonge mi ĉesis pro emeritiĝo mi povas diri pri la lastaj jaroj kiel profesia fervojisto, ke mi kune kun aliaj esperantaj kolegoj ni agadis kiel "ponto" inter nia estraro kaj nia esperanta movado; penis por interesigi ilin en la disvastigo de nia lingvo pere de materiala aŭ ekonomia helpo.

Ankaŭ faris varbadon vidalvide inter junaj fervojistoj; ili konas multe pri la vivo ene de nia klubo sed aparte de la turisma celo, ne interesiĝas pri esperanto.

*G.A.:* AEU, per siaj eldonaĵoj klopodas pri la aplikado de E-o en la ekonomia kampo. Ĉu vi konsentas kun la estraro de AEU?

R: Jes, mi estas akorde kun AEU pri la aplikado de E-o en la ekonomia vivo, ĉar estas jam tre konata la fakto ke ne sufiĉas la "interna ideo" por ke la laboristoj (aŭ junaj senlaboruloj) interesiĝu pri Esperanto aŭ pri iuj ajn socialaj problemoj. Dum kelkaj jaroj en niaj jarraportoj al Internacia Fervojista Federacio, rilate al varbado de novajn membrojn, ni diris pri la konstanta problemo de la juneca

senvigliĝo, produkto de la nuntempa vivsistemo. Kion ni faris por solvi tion?

*G.A.:* Esperanto estas denaska internacia linngvo. Kion vi opinias pri la klopodoj de ERA ("Esperanto Radikala Asocio") por ke la itala registaro kaj UNESCO subtenu konkrete kaj efike la disvastigon kaj aplikadon de Esperanto?

R: Mi konas nenion pri la "Esperanto Radikala Asocio", sed pri la menciita subteno de la itala registaro kaj UNESCO mi pensas ke nia lando havas nuntempe specialan konjunkturon por konkuri -apogante- la iniciaton de ERA. Se la hispanaj societoj kaj grupoj kun efikoplana orientado, ekzemple, de nia Federacio, organizus solidaran kampanjon aldirektita al nia registaro (kies politika situacio nuntempe, antaŭ Europa Unio kaj aliaj internaciaj Organoj, estas je la plej alta kaj prestiĝa nivelo ĝis nun) por ke faru apogon por disvastigo de Esperanto.

*G.A.:* En ajna amasa organizaĵo estas elito. Laŭ via kompreno, la Movado en Hispanio disponas eliton? Ĉu sufiĉas elito en beletra kampo aŭ estas necese disponi tre kapablajn personojn agantajn ankaŭ en aliaj kampoj, kiel la



socia, la religia, la sindikata, la scienca...?

R: Laŭ mia modesta kono mi malmulte povas opinii pri la disponebleco de elito en la hispana movado, sed nuntempe tiel kiel evoluiĝis la vivsistemo, mi konsideras ke estus necese havi sufiĉajn kapablajn personojn, spertajn en la diversaj kampoj kaj ke ili talente reprezentu antaŭ la oficialaj instancoj la vera celo de la Lingvo Esperanto, ĉar nuntempe saĝas instrumento por turismi aŭ ekskursi en amikebla etoso.

G.A: En la E-aj kunvenoj oni pritraktas, preskaŭ ekskluzive, la Movadan situacion. Laŭ vi, kio mankas kaj kio kontentigas en ili?

R: En la diversaj E-aj kunvenoj, kursidoj kaj aliaj kvazaŭsimilaj agadoj neniu alportas gravan solvon por impulsi Esperanton. Laŭ

mi, mankas elekti adekvatan kaj vere utilan Esperantan lernolibron adoptitan kaj adaptitan por ĉiuj Esperantaj lernejoj. Mi ne estas klera kaj konsekvence, ne kapablas trovi solvon.

G.A: Por fini intervjuon, ĉu vi deziras aldoni ion specialan?

R: Jes. Nia Asocio en kunlaboro kun aliaj Esperantaj grupoj el Barcelono kaj provinco, partoprenas en la organizo ĉiu jaro de la Zamenhof-Festo, kun partopreno de centoj da samideanoj. Ankaŭ, kelkaj el niaj membroj laboras tre aktive kun membroj de Kultura Sekcio de Hispana Esperanto Muzeo, en la organizado de Internacia Kultura kaj Turisma Esperanto-Semajno, kiu okazis tiu ĉi jaro, jam la KVARA, de la 5a ĝis la 12a de oktobro, en la urbo Calella, ("Costa del Maresme").

ABONU KAJ ABONIGU  
**EL POPOLA ĈINIO**

Unu el la plej popularaj revuoj en la internacia Esperanto-Komunumo, distribuita de la Redakcio ekde 1994

- 12 numeroj jare
- 52 paĝoj ĉiunumere, kun koloraj kaj nigrablankaj bildoj
- Informoj pri la Esperanto-movado tra la mondo
- Esperanto-rubrikoj "Voĉo de Esperantistoj", "Por Komencantoj", "Inter Ni" k.a.
- Aktualaj raportoj pri la progreso kaj socia kaj popola vivo de nuna malferma Ĉinio
- Interesa, art koloj pri la tradicia kulturo, historio, literaturo, arto, medicino, filozofio, k.a. de ekzotika Ĉinio



**Abonprezoj varias laŭlande. Abonebla ĉe la landaj perantoj aŭ ĉe UEA.**

Hispana peranto: F. Gómez Martín, Corbeta 8, 5ªA, 28042 Madrid



## Niaj ĉarmaj eŭropaj parlamentanoj

Ili ne aperas tre ofte ĉar, verŝajne, la membroj de la Eŭropa Parlamento, do la Parlamento mem, havas malaltan rangon en la organizado de la vivo en la Eŭropa Unio. La reprezentantoj de la popoloj, rekte elektitaj mem de la civitanoj, apenaŭ diras ion pri la nova Eŭropo.

Sed hodiaŭ ne estas mia celo analizi la taskojn oficialajn de niaj eŭropaj parlamentanoj. Hodiaŭ mi deziras al vi atentigi pri la spektaklo kiun ili prezentas, kiam okazas parlamentan sesion. Ofte mi ne scias ĉu ili estas astronautoj, ĉu ili aŭskultas muzikon. Vi jam povas imagi, ke mi aludas al tiuj aparatoj, kiujn havas la parlamentanoj algluitaj al siaj oreloj. Ofte mi pensas, ke ili uzas tiujn ilojn por ne aŭskulti la aliajn kaj tiamaniere dormi pli bone (tiu opinio ne estas mia, sed mi ĝin akceptas). Eĉ infano sesjara iam diris al mi, *jen tiuj sinjoroj aŭskultas muzikon*. Sed la bildo estas amuziga, tiom da kapoj, tiom da aŭskultiloj. Kaj kion diras la parolanto, nu, tion neniu el la parlamentanoj scias, escepte de tiuj, kiuj apartenas al la lingvo parolata. Mi pensas, ke se ili honeste deziras esti sinceraj ili devas diri, mi aŭskultis tion kion diris la tradukist(in)o. Feliĉed, malofte la sidlokoj de la Parlamento estas okupataj. Tre ofte estas sinjoro, kiu parolas kaj paroladas, sed nur aŭskultas lin dek dudek personoj. Kia skandalo, kiam mi laboris, se mi alvenis duonhoron malfrue al la laborejo, mi jam riskis eĉ la perdon de mia laborposteno.

Tamen ni ne insistu pri ĉi tiu afero. Kio vere konsternigas kaj samatempe ridigas min estas la fakto, ke tiuj inteligentaj sinjoroj devas aplikadi tiujn aparatojn al la oreloj. Nun, kiam tiom oni laŭdas la atingojn de la sciendo kaj la tekniko, ankoraŭ ne estas solvita la problemo de la lingva interkompreno. Kaj vi atentu, ke mi nur diras la lingvan interkomprenon, kio okazas en la terenoj de la homa kunvivado, geamikoj vi mem prefere respondu. Ni, afablaj eŭropeanoj varmekaj entuziasme deziras la Eŭropan Union, kaj ni ne kapablas lingve kompreni la najbaron. Ĉu la rezulto estos kontentiga? Ĉi tiun demandon mi jam kuraĝas respondi: la rezulto ne estos bona, eĉ se ĝi estas akceptata de ĉiuj eŭropaj membroj. Sed tiu lingva problemo ŝajnas ne havi solvon, ĉu almenaŭ niaj reprezentantoj ne volas ĝin solvi. Sed niaj parlamentanoj, kiuj vivas en luksa vivo, rajtas havi tradukiston. Vi imagu, mi povas same postuli, se mi iras al Germanujo aŭ al Anglujo, kial ne, ĉu mi ne estas civitano de la Eŭropa Unio? Do, laborone mankos, karaj geamikoj, ĉar ni jam devas komenci lerni lingvojn kaj pliajn lingvojn. Kaj ni ĉiuj estos ege feliĉaj.

*(Daŭrigo sur la paĝo 14)*



## Recenzo

▪ Diversaj aŭtoroj, *Vinilkosmo-Kompil'*, Volumo 2. Eŭroka. ▪

Post longa strebado fare de Eŭroka (Esperanto-Rok-Asocio), jen finfine la dua volumo de *Vinilkosmo-Kompil'*.

*Vinilkosmo-Kompil'*. Vol.2

estis produktita per helpo de ĉiuj muzikgrupoj kiuj partoprenis, de ĉiuj antaŭaĉetintoj, de Studio Stansy Production, sed ankaŭ per la financa helpo de Eŭropa Junulara Fonduso (tra TEJO), Fondaĵo Carson (Kanado) kaj Fame Fondaĵo (Germanio).

Ĝi mendeblas ĉe Eŭroka, por 120 francaj frankoj (FF) se vi volas kompaktan diskon aŭ por 70 FF se vi volas kasedon (aldonendas al tiuj ĉi prezoj la sendokostoj. La samaj kondiĉoj validas ankaŭ por la unua volumo.)

Kion ni aŭdos? Entute 19 kanzonojn de ege diversaj stiloj: de la angla fraŭlino E. Barlaston (kun ŝia preskaŭ opereteska stilo, ĝis la roka grupo el Ukrainio *Piĉismo*. Enestas verkoj de konataj muzikistoj esperantaj, ludante sole anstataŭ grupe (ekz. Martin Wiese, de *Persone*, Micke Englund, de

*Amplifiki*, kaj Milan Dočekal, de *Team*), konataj nomoj de la Esperanto-Movado (kiel fraŭlino Barlaston aŭ Saskia Idzerda de TEJO)...

Oni povas konstati, ke ĉi tiu Antologio estas sufiĉe internacia, eĉ se Francio estas multe pli reprezentita (9 kanzonoj) ol la aliaj landoj; ni havas 2 el Svedio, kaj po 1 el Brazilo, Britio, Italio, Nederlando, Ruzio, Slovakio, Ukrainio kaj 1 kunlaboro Afrik-Skandinava! 10 kanzonoj estas originale esperantaj, la ceteraj, adaptigoj / tradukoj el la franca (4), angla (2), okcitana, slovaka kaj portugala (1).

La kompakta disko haveblas kun libreto kiu entenas la tekstojn de ĉiuj kanzonoj, krom diskografio kaj kontaktadreso de ĉiu kantisto / grupo. Bedaŭrinde (sed kompreneble, ĉar ĝi tro grandas) la libreto mankas ĉe la kasedo.

Entute valora antologio de Esperant-lingva muziko, nepre havenda de ĉiuj amantoj de la moderna muziko. Verŝajne neniu ŝatos ĉiun muzikon, sed ĉiuj ŝatos la antologion, kiuj por multaj estos trezoron por konatiĝi kun la muziko en la internacia lingvo.

SIZIFO





.....  
 ■ 365 Tagoj el la Biblio en Esperanto, kompilis Jerald T. Veit, 1996, ■  
 ■ Milwaukee, Usono. Senpaga. ■  
 .....

Temas pri 44paĝa broŝuro, kiu entenas 365 citaĵojn el la Biblio. Unu citaĵo, unu tago. Sufiĉe simple, ĉu ne? La kompilanto elektis mallongajn legaĵojn por ĉiu tago de la jaro.

En vortoj de la aŭtoro, "la Biblio en Esperanto havas longan tradicion. Estis Zamenhof mem kiu tradukis la Malnovan Testamenton el la hebrea originalo, fininte la laboron nur kelkajn semajnojn antaŭ lia morto en 1917... El ĉiuj tiel nomitaj planlingvoj, Esperanto estas la sola, en kiu ekzistas plena traduko de la Biblio... Laŭ informoj de la Unuiĝintaj Biblio-Societoj, je la fino de 1992 ekzistis tradukoj de la tuta Biblio en 333 lingvoj... Tio signifas, ke la Biblio estas la plej vaste tradukata kaj legata libro en la historio de la homaro."

La aŭtoro elektis la versojn por ĉiu tago laŭ sia bontrovo, kun la celo elekti tiujn, kiuj ŝajnis la plej signifoplenaj por nuntempaj homoj. La teksto ĝenerale sekvas la tradicion Esperanto-Biblion eldonita de la Brita kaj Alilanda Biblia Societo.

La ĝenerala impresado estas tre bona, ĉar eĉ se nur broŝuro, la kvalito de la presaĵo estas bona, kaj bone legebla. Krome, ĝi haveblas *senpage*. Jes, ĵal Tutsimple petu ĝin de *Jerald Veit, Kristana Inform-Centro, 3578 S. Taylor, Milwaukee WI 53207, Usono.*

(Strange, ke la aŭtoro ne pensis pri superjaroj! Kio pri la 29a de februaro?)

SIZIFO

.....  
 ■ Estimata ano de AEU:  
 ■ Vi jam scias, ke AEU kalkulas kun viaj kotizoj por sia agado. La kotizo ■  
 ■ estas tre malmultekosta: 1700 ptoj po jaro. Se vi ankoraŭ ne pagis ■  
 ■ ĉijare, bonvolu sendi 1700 ptojn perpoŝte al AEU, Apartado 864, ■  
 ■ 29080 Málaga, enspezi ilin per la konto 17160710 de la *Caja Postal* ■  
 ■ (Poŝta Ŝparkaso). Vi ankaŭ povas peti de ni instrukciojn por pagi ■  
 ■ perbanke. Tio estas plej konvena por ĉiu, kiu ne volas forgesi pri la ■  
 ■ kotizo: vi donas al ni rajtigilon, kaj ni ĉiujare sendos al via banko ■  
 ■ ordonon rilatan al via kotizo. ■  
 ■ **ATENTU:** ekde la 1a de januaro la kotizo estos de 1900 pesetoj. ■  
 ■  
 .....



## Radioamatora Angulo

### La Paket-radio

Lastatempe estas pliofte uzata la tekniko *packet-radio* (paket-radio, hispanlingve *radiopaquete*). Ĉi tekniko estas nova ilo por la kontaktoj inter radioamatoroj, prefere uzata de tiuj kiuj ŝatas la komputilojn kaj la radion. Per la paket-radio la elsendanto sendas mesaĝon per la komputilo; speciala modemo nomita TNC akceptas la informon *dispecigante* ĝin en malgrandaj eroj nomitaj *paketoj*. Krom la informo, ĉiu paketo enhavas eron rilatan al la radioelsendinto kaj la radiostacio akceptonta. La fina stacio ricevas ĝin pere de anteno kaj denove en la TNC modemo la informeroj transformiĝas en kompletan mesaĝon kiu estas adresita al la komputilo.

La sistemo estas simila al la nuntempaj kontaktoj pere de komputiloj, sed anstataŭigante la telefonan linion per la radiaj ondoj. Ja malpli da kosto! Por instali paket-radion nur estas necese disponi je, krom la radioamatora leĝa permeso, UHF/VHF radioelsendilo, anteno, komputilo kaj TNC (speciala modemo).

Ene de la Esperanto-movado, kaj konkrete apartenantaj al la Internacia Ligo de Esperantistaj Radioamatoroj (ILERA), jam en 1994 estis konitaj pli ol 50 voksignoj el 19 landoj. Pli ol 10 en la apuda Francio, kie eblas la paket-radiaj kontaktoj ĉefe lunde je la 18a horo (loka tempo) ĉe 144366 Khz en telefonio J3E.

ECB7-I-046745  
STACIO ESPERANTO



### NUL kaj LACUL



- Mi eble baldau eksigos el la asocio...
- Kiel?
- Ŝi ja deziras ke mi estu aktiva!

Prenita de la revuo de *Esperanto-Nederland*.



## Traduka Konkurso

Nacia Sindikato de Hispanaj Verkistoj kaj Andaluzia Esperanto-Unuiĝo kunorganizas la 2an Tradukan Konkurson *José Rodríguez Huertas*, kiun regos jena

### -Regularo-

- ① Nur eblas konkursi per tradukoj en la hispanan de originaloj verkitaj en Esperanto.
- ② Ĉiu konkursant(in)o rajtas partopreni per tri verkoj maksimume. La konkursaĵoj ampleksu minimume ses paĝojn je grandeco A-4, po 30 linioj.
- ③ Ĉiu konkursant(in)o devos sendi tri ekzemplerojn de la traduko per kiu ŝli konkursas, tajpitaj en duoblaj interlinioj kaj kun la indiko "Concurso de Traducciones *José Rodríguez Huertas*" ("Traduka Konkurso *Jozefo Rodríguez Huertas*"). Ankaŭ sendendas kopio de la Esperanta originalo.
- ④ Ĉiu verko prezentita al konkurso estu subskribita per pseŭdonimo aŭ moto. Oni akompanu tute fermitan koverto ene de kiu troviĝu antaŭnomo, nomo, adreso kaj telefonnumero de la tradukinto. Sur la koverto oni skribu lamoton aŭ pseŭdonimon de la tradukinto, kaj la originalan titolon de la responde E-verko, ties aŭtoron kaj informon pri la eldono de la tradukitaĵo.
- ⑤ La dat-limo (laŭ la poŝtstampo) por sendi la konkursaĵojn estas la 31a de oktobro de 1997. Tiurilate, la poŝta stampo atestu la daton.
- ⑥ La Verdikto neapelacieblas.
- ⑦ La 14an de decembro 1997 oni publikigos la verdikton kaj la juĝantaron.
- ⑧ Oni sendu la verkojn al Sindicato Nacional de Escritores Españoles, Apartado 632, E-20915 Malago, Hispanio.
- ⑨ La premio konsistos el 20000 pesetoj en E-libroj.
- ⑩ La livero de la premio okazos la 12an de decembro, 1997, ĉe Liceo de Málaga (Plaza del Carbón 3, Malago).
- ⑪ Se ĝi ŝatas tion, Nacia Sindikato de Hispanaj Verkistoj rajtos publikigi la verkon premiitan kaj ĝin posedos. Krome oni registros ĝin kiel proprajon de la responde tradukinto kaj ĉi tiu rajtos enlistiĝi, kiel ordinara membro en tiu organizo.
- ⑫ La aŭtoroj de tradukoj ne premiitaj rajtos repreni siajn verkojn ĉe Liceo de Malago ĝis la 15a de januaro, 1998. Post tiu dato, oni neniigos la tradukojn ne reprenitajn kaj ties fermitajn kovertojn.



## Poezia Angulo

### Preĝo

Estu tiel laŭ via volo, Sinjoro.  
 Plenumita estu via sanktega volo.  
 Se via deziro estas ke mi inter rozoj  
 ridu ĉe la matenruĝoj de la vivo,  
 fariĝu via dia volo.  
 Se via deziro estas ke mi inter kardoj  
 sangumu ĉe la nepenetreblaj ombroj  
 de la senfina nokto,  
 via parolo estas la unua kaj lasta.  
 Mi dankas vin se vi donas lumon  
 al miaj okuloj,  
 se vi metas en ilin blindecon, mi  
 ankaŭ dankas.  
 Mi dankas pro mia tuto, pro mia  
 malpleno.  
 Fariĝu via dia volo.  
 Plenumita estu via sanktega volo.  
 Estu tiel laŭ via volo, Sinjoro.  
 (Tradukis JOHANO VÉLEZ)



### Oktobro

Mi kuŝis sur la tero kastilia,  
 beno de senfina horizonto,  
 kaj ĝin aŭtuno volvis en blondo  
 tenera de krepusko hel—radia.

Plugilo lanta—puŝa, sendevia,  
 la sulkojn faris per la soka fronto,  
 kaj simpla mano ŝutis kun volonto  
 la semojn al la kampo multe—stria.

Plenan de sento alta kaj profunda  
 la koron mian pensis mi elŝiri  
 kaj ĵeti al la sin' de sulko tera,

por vidi ĉu, el tia sem' engrunda,  
 jam en printempo povus sin eltiri  
 la arbo de l' eterna amo vera.

(Tradukis FERNANDO DE DIEGO, en sia libro  
*Sentempa Simfonia*)

*Juan Ramón Jiménez, Moguer  
 (Huelva), 1881 – S. Juan de Puerto  
 Rico 1958.*

*Nobel-premiito en 1956.*



$$e = mc^2$$



### Scienca Paĝo

#### Elektraj aŭtomobiloj

Malgraŭ la fakto ke la bencino aŭ la gasoleo ŝajnas, ankoraŭ, neanstataŭigeblaj por la aŭtomobiloj, estas evidente ke multaj aŭto-kompanioj jam ekesploras la eblecon amase konstrui elektrajn aŭtomobilojn. La avantaĝoj de tiuj aŭtomobiloj estas okulfrapaj: malpli da malpurito, sen bruoj kaj ĉefe tio supozas anstataŭi finiĝontan energion per alia porĉiama. Eĉ la malavantaĝoj de la elektraj veturiloj (ekz. malpli da

rapideco, aŭtonomeco kaj pli alta kosto) povas esti solvataj per la konstanta esplorado.

Kelkaj kompanioj produktis elektrajn modelojn, tamen ili ankoraŭ estas tre multekostaj; krome, ili estas malgrandaj, nur por du personoj ĉar la postaj seĝoj estas anstataŭigitaj de baterioj. La lasta aŭto-kompanio kiu studis elektran modelon estas la korea *Hyundai*, per la modelo *Accent*. Tiu aŭtomobilo uzas la energion de baterioj el nikelo, akcelas de 0 ĝis 100 kilometroj/horo en 15 sekundoj kaj ĝi povas funkcii aŭtonome dum 390 kilometroj.

La sciencistoj de tiu kompanio opinias, ke baldaŭ estos eble konstrui kaj komercigi elektran aŭtomobilon kiu estos kapabla atingi 160 kilometrojn/horo, povos funkcii aŭtonome dum 500 kilometroj kaj bezonos nur 15 minutojn por reŝargi la bateriojn.

JOSÉ M<sup>º</sup> RODRÍGUEZ



# HEROLDO

## DE ESPERANTO

Hispana peranto: Luis Serrano Pérez, Font Nova 32, 08202 Sabadell



*(Daŭrigo de la paĝo 7)*

Mi neniam estis en tiu, ĝis nun senutila, Eŭropa Parlamento, sed mi supozas, ke flanke de iu franca parlamentano povas sidiĝi parlamentano el Portugalujo aŭ de nia lando, kiu ne konas la francan lingvon. Kaj do, kiamaniere ili sin komunikas, se mankas la tradukisto? Kion diras unu al la alia? Sendube la silento estas granda kaj embarasiga. Kaj, ĉu tiamaniere oni povas konstrui la novan Eŭropon? Eble kelkaj altranguloj, kiuj scias tri aŭ kvar lingvojn, pensas ke la eŭropaj civitanoj estas kvazaŭ ŝafoj, kiuj obeos la voĉo de la mastro. Malbona afero ĉi tiu. Mi jam deziras interbabili kun ĉiu mondano, kaj se tio ne povas esti, almenaŭ mi povu interkompreniĝi kun lamembroj de mia familio, kun la membroj de tiu granda familio kiu laŭdire estos Eŭropo. Eble mi eraras, sed la vojo(j) elektita(j) de niaj gvidantoj en tiu tasko de reciproka interkompreno, almenaŭ lingva, estas eraraj. Ekde nun bona politikisto estos tiu, kiu konos multajn lingvojn. Kia feliĉol

Mi jam deziras scii, kio okazas kiam mankas la elektron en tiu kaj aliaj internaciaj institucioj. Ĉiuj niaj kleraj politikistoj dependas de tio, ke ne fiasku la elektra konekto. Daŭre la homo perdas sian propran personecon, kaj submetas sian propran ekziston al la plej diversaj maŝinoj, kiuj estas la veraj regantoj de nia vivo. Ĉu oni povas rezigni eĉ la propran voĉon? Ĉu oni povas rezigni la personan interkomprenon? Ĉu oni povas kunvivi kun kiu ni ne povas parole interkompreniĝi? Ankaŭ la lingvo estas grava por tiu estonta Eŭropa Unio.

L. SERRANO



Se vi ne trovas en *Gazeto Andaluzia* kion vi ŝatus legi bonvolu mem verki artikoleon. Ni volonte aperigos ĝin kondiĉe ke ĝi rilatu Esperanton aŭ Andaluzion. Se eble, sendu ĝin al la redaktoro (Poŝtkesto 5184, 29080 Malago) sur komputila disketo (PC aŭ Macintosh, kompreneble resendota), klare tajpita aŭ per e-poŝto ([delpozo@redestb.es](mailto:delpozo@redestb.es)).



## Esperanto-disko

Disko en Esperanto jam sonas - tutmonde

De antaŭ kelkaj tagoj sonas ĉiutage en muzikradioj de tuta Hispanujo disko en Esperanto. La verko mem nomiĝas *Esperanto*, kaj estas eldonita de *Warner Music Spain*. Ŝajne ĝi ankaŭ lanĉiĝos samtempe en multaj landoj, en la monato januaro.

Eble iuj el vi aŭdis diskon nomitan *Angelis* far Elbosco, eldonitan plurlande en 1995, kantitan latine kaj angle fare infanaj korusoj. Ĝi furoris, kaj pecoj el ĝi reaperis en diversaj kompiloj; vendiĝis 250 000 ekzempleroj, nur en Hispanujo.

Nu, la sama komponisto-produktisto kiu ĝin realigis, konata en nialandaj profesiaj radio- kaj muzik-medioj, simpatianto de Esperanto sed neparolanto, elpensis novan projekton: disko en Esperanto kaj en la angla, kantota de diverslandaj korusoj, kun muziko adaptita el klasikaj komponaĵoj.

Li vizitis la Centran Oficejon de HEF por peti helpon kaj por tiu laboro li ofertis pagi sumon al la asocio. Por komenci CO de HEF do provizis lin per diversa materialo dulingva, en la hispana kaj en Esperanto.

Fine de julio li neatendite telefonis, ke li urĝe bezonas tujan helpon. Ĉiuj kantoj estis jam finitaj. Li eĉ konvinkis la kompanion, ke la disko estu nure en Esperanto, sen angla. Malgraŭ eraretoj, la tekstoj estis ĝenerale sufiĉe bonaj. Li verkis ilin kopie-refande el diversa materialo pri kiu li ne volis rakonti.

Laŭplane la tekstoj kantotis de profesiaj korusoj en Sofio, Moskvo kaj Havano. CO de HEF proponis, ke kompetentaj surlokaj esperantistoj ĉeestu por helpi kaj konsili dum la registradoj. *Warner* entuziasme kaj danke akceptis la proponon, kaj petis la CO-n aranĝi tuj la kontaktojn. Same, ĉar ili bezonis tradukon en la anglan de ĉiuj tekstoj, HEF tuj proponis fari pere de la brita asocio, kion ili same akceptis.

Nur la plano pri Havano fiaskis, pro manko de interkonsento inter la produktistoj kaj la kuba sonstudio (kvankam, strange, sur la disko estas menciita Havano inter la registrolokoj). Aliloke oni registris fonajn kaj atmosferajn voĉojn kaj sonojn, sen rilato al Esperanto.

La registradoj en Sofio kaj Moskvo estis plene sukcesaj. Ambaŭkaze la skipo revenis Madriden tre kontenta pro la rezulto kaj favore impresita de la kompetenta helpo de la lokaj esperantistoj.

Post tio la kunlaboro kun HEF restis preskaŭ finita. Mankis nur revizii la kompostitajn tekstojn kaj ĝenerale la diskokajeron, por forigi eblajn

(Daŭrigo sur la paĝo 20)



## <http://www.redestb.es/personal/delpozo/>

Pli kaj pli ofte oni trovas en sian ĉiutagan vivon la misterajn literojn *http://www...* per kiuj pli kaj pli da homoj kaj firmaoj anoncas sian TTT-paĝon. TTT estas la Tut-Tera Teksaĵo, kiun en Hispanio ni konas per la anglalingva esprimo WWW (el la angla *World Wide Web*), parto de la *Interreto* kiu kombinas tekstojn, sonojn, bildojn, videojn... Per *http://www...* komenciĝas preskaŭ ĉiuj URL (teknika nomo, kiu signifas pli malpli *TTT-adreson*).

Kaj kio signifas la titolan *http*? Temas pri la TTT-paĝaro de AEU. Ekde oktobro viziteblas jam la paĝaro de AEU, dokumentaro dulingva (en la hispana kaj en Esperanto) kiu celas diskonigi kaj Esperanton, kaj Andaluzion, kaj, kompreneble, nian asocion.

Zorgas ĉi tiun novan servon de AEU la redaktoroj de *Gazeto Andaluzia*, samideanoj J.M. Rodríguez (atingebla per la e-poŝta adreso [joser@lander.es](mailto:joser@lander.es)) kaj J.F. Martín ([delpozo@redestb.es](mailto:delpozo@redestb.es)). Ĝis nun en la paĝaro de AEU troveblas multaj informoj priesperantaj (kompreneble en la hispana), bazitaj sur la *Informe sobre el Esperanto* pri kiu legeblas en *Gazeto Andaluzia* 47, oni povas aŭskulti Esperantajn sonojn, legi la Manifeston de Prago (en la hispana kaj en Esperanto), kaj informojn pri nia Asocio kaj *Gazeto Andaluzia*. Krome, en ĝi nun enestas vizitlibro, t.e., sekcio kie la vizitanto povas lasi mesaĝon por vizitantoj, kaj legi tiujn de vizitintoj, kaj vizitkalkulilo, kiu montras al la vizitanto kiom da vizitintoj legis niajn paĝojn antaŭ ŝli.

Fine, en aparta paĝo ni enmetis ligilon al multaj aliaj Esperantolingvaj paĝaroj, tiel ke krom la nia, oni povos viziti la paĝaron de UEA, AERA kaj

(Daŭrigo sur la paĝo 21)



Aspekto de la unua paĝo de AEU per *Netscape Gold 3.0*





## Andaluza Kulturo

### Pri la deveno de la vorto *flamenco*

La vorto *flamenco* difinas, ene de la andaluzia kulturo kaj ankaŭ ĉe tiu hispana, unu el la plej originalaj folkloraj manifestadoj, kaj samtempe ĝi esprimas, pere de la tekstoj de la kantaĵoj, profundan koncepton de la mondo kaj de la vivo mem.

Ĉiu aŭtoroj kiuj studis ĝin elstarigas la obskurecon en kiu troviĝas ĉi kulturo, temas pri mistero, eble jen l' *o jondo* (profunda) kiu envolvas ĝian naskiĝon kaj unuajn paŝojn. Kiel asertas Rafael Alberti, "*flamenco* estas kanto terure andaluzia, de ne-klaraj originoj".

Sed la mistero de tiu arto ankaŭ aperas en la nomo mem. Diversajn teoriojn oni proponas, sed pri preskaŭ ĉiuj eblas kontraŭdiro: kelkaj argumentas pri la araba deveno de la vorto. Blas Infante mem parolas pri la unuigo de du arabaj vortoj, *felach* kaj *mengu*, kies signifo estus *trairanta kamparano*. Por aliaj, la vorto devenas de *felai-kum* (terkulturisto). Tamen ambaŭ proponoj ŝajnas ne-certaj, pro la fakto ke la vorto *flamenco* ne aperas ĝis la fino de la 18a jarcento. Do estas malfacile supozi ke ĝi devenas de la araba, aperinte 300 jaroj post la konkero de la lasta araba reĝlando

Granado fare de la kastili-aragonaj gereĝoj.

Por aliaj, ĉefe la brita romantikulo G. Borrow, *flamenco* estas la vorto per kiu la andaluzoj nomas la ciganojn, supozante ilian flandran originon. Rifuzenda teorio se ni antaŭscias pri la orienta deveno de tiu trairanta popolo.

Por kelkaj studemuloj, ekz. Ríos Ruiz, *flamenco* en la popola andaluzia ĵargono esprimas provokeman agadon, simila al tiuj de la flandroj kontraŭ la hispanaj reĝoj.

Tamen, l' *o vere* certa estas ke la vorto *flamenco* unuamomente estas uzata por nomi la andaluziajn ciganojn kaj poste ilian kantadon (t.e., *soleares*, *seguiriyas*, *tonás*, *tangos*, *alboreás*...) miksitaj en Andaluzio kun la popolaj ne-ciganaj kantoj (*fandangos*, *sevillanas*, *malagueñas*, *granaínas*, *tarantos*, ktp.). Do, per la vorto *flamenco* oni esprimas kantadon, dancadon kaj gitarludadon, kiuj estas la esprimiloj de la arto de la cigan-andaluzia popolo, kiu ankaŭ povas esti nomata *jondo* (profunda) kun la tragika kaj esprimiva forto de tiu adjektivo.

Kaj en esperanto? En la malgranda poŝvortaro de J. Paluzie-Borrell aperas "*flamenco* (andaluz)" kiel *cigan-andaluzia*, tamen evidente tio estas nur



klarigo. En *Plena Ilustrita Vortaro* ne aperas la vorto (ĉar flandro ankaŭ signifas *flamenco*, sed tiu estas la loĝanto de Flandrio, kvankam Zamenhof ankaŭ uzas *flamando*, ja pli proksima al la hispana vorto). En kelkaj antikvaj andaluziaj E-revuoj aperas samtempe *flamenco* kaj *flamenko*, sed ĉiam kursive aŭ inter citkrampoj. Do, estus preferinde uzi flamenko (sen citkrampoj nek kursivo) por esprimi la arton unue de la cigan-andaluzoj, kaj poste jam de la tuta Andaluzio. Kaj pri tio mem, pri la formoj kaj la kantistoj oni preparolos en venontaj numeroj.


J.M.R.H.



## Esperanto en la Bibliotekoj

La Ĝenerala Asembleo de AEU komisiis samideanojn Martín kaj Rodríguez pri la tasko studi la eblecon donaci al andaluzaj bibliotekoj libroj pri Esperanto.

La studo jam komenciĝis. Kelkaj aferoj estas tre gravaj, kaj la komisiitoj bezonas ĉies helpon pri tio. La monaj rimedoj de AEU ne estas multaj, do ni ne povos donaci librojn al ĉiuj bibliotekoj. Oni



elektos urbojn laŭ la kvanto da loĝantoj. Tamen, ni bezonas scii, kiu biblioteko en ĉiu urbo estas pli konvena. Vi povas helpi la komisiitojn informante pri la plej gravaj bibliotekoj de via urbo, aŭ pri la plej konvenaj.

Estas ankaŭ konvene scii vian opinion, ĉu donaci lernolibron de Esperanto, aŭ informolibron pri Esperanto.

Kaj fine, sed ne malpli grave, se vi deziras kunlabori mone, sciigu tion al ni, aŭ uzuan bankkonton.

Kontaktu la redaktorojn por pliaj informoj.



AEU disponas korespondajn kursojn: bazan, mezan kaj superan. Diversaj prezoj, diversaj opcioj. Kaj vi ĉiam havos la helpon de koresponda instruisto. Kontaktu AEU, p.k. 864, 29080 Malago.



## Paĝoj de nia Historio

**Notoj pri Esperanto kaj Andaluzio**

La fondiĝo de la unua Andaluzia Esperanto-Federacio  
 La unuaj informoj rilataj al la ideo krei andaluzian E-federacion aperas en la jaro 1913. Tiam, la s-ro Trinidad Soriano, prezidanto de la Grupo Esperantista de Sevilo, proponis la fondiĝon de andaluzia federacio, kaj por tio li kontaktis kun la asocioj tiutempe ekzistantaj, t.e. en Kordovo, San Fernando kaj Melilo. Ĉi grupoj akceptis la ideon proponante renkontiĝon dum la jarfino por paroli pri la ideo. Kvankam la nombro da partoprenantoj ŝajnas sufiĉa (ĉeestis 11 personoj), oni konsideris ke la projekto devus esti pli amase apogata, do oni decidis prokrastigi la aferon.

En la jaro 1916 malaperis la Hispana Societo por la Propagando de Esperanto, la tiutempa hispana asocio. Post tio, la movado serĉis novajn vojojn por la agado. Komencis tiam diskuto, ĉu organizi sin pee de tutnacia movado aŭ per regionaj asocioj eble konfederataj. Ekde la jaro 1910 ekzistis la Kataluna Federacio kaj en 1916 denove ekde la Sevila Grupo oni lanĉas la ideon fondi Andaluzian Esperanto-Federacion. Ĉi-foje la respondo estis pli unuanima: krom la grupoj de San Fernando kaj Kordovo oni ricevis apogojn de esperantistoj de Jaén, Baza, Riotinto, San Juan de Aznalfarache, Villanueva del Arzobispo, Pueblonuevo kaj El Valle.

La 21an de Januaro de 1917 renkontiĝis la unua asembleo de la Andaluzia Esperanto-Federacio kaj la 21an de Februaro la estraro, prezidata de Trinidad Soriano. La unua kongreso de la Federacio okazis la 18an de aprilo de 1917 en la biblioteko de la Sevila Societo de Amikoj de la Lando.

JOSÉ M<sup>o</sup> RODRÍGUEZ

Ĉi konitaĵojn ni povas oferi al Vi dank' al la ekzisto de la Arĥivo de AEU, kie ni pretendas gardi ĉion rilatan al la Esperanto-Movado en Andaluzio. Verŝajne ni tro pretende nomas tiun sekcion Arĥivo, malgraŭ la fakto, ke ĝi estas nur kolekto de antikvaj ĵurnaloj kaj esperantaĵoj. Tamen, ni volas krei veran arĥivon, la arĥivon de Via memoro. Do, se Vi ne scias kion fari kun Viaj E-revuoj aŭ esperantaĵoj kaj Vi estas preta doni ilin al ni, bv. kontakti kun ni. Ni pagus ĉiajn sendokostojn.

HISTORIA ARĤIVO DE AEU  
 POŝTKESTO 611  
 E-14080 KORDOVO



(Daŭrigo de la paĝo 15)  
erarojn kaj mistajpojn.

La kajero enhavas la originalajn tekstojn en Esperanto kaj tradukojn en la angla, franca, germana, hispana, itala kaj japana. La aspekto kaj aranĝo estas tre bonkvalita. La muziko estas tute sintetizila, moderna adapto kaj reverko de klasikaj pecoj ne tre konataj por la ĝenerala publiko. La nura tre konata melodio estas *Odo al ĝojo* de Betoveno (kanto *La rido*). Parenteze ni aldonu, ke la tekstoj haveblas ĉe la redaktoro de AEU.

Nun la sukceso de la disko dependas parte de ni mem. Necesas ne nur aĉeti ĝin, sed peti ĝin plurfoje en diskovendejoj kaj de radiostacioj, ree kaj ree.

*Cadena 100* montras en ĵurnaloj la 100 plej aŭskultatajn kantojn, kaj "nia" *Astro Jupiter* estas jam (28an de novembro) en la loko 78a. Nu, kun la listo estas voĉdonilo, do ni voĉdonu!

MARCOS CRUZ  
(REFANDITA DE SIZIFO)

## Krucvortenigmo

Pro abundo de materialoj, ni ne havas spacon por krucvortenigmo en ĉi tiu numero de *Gazeto Andaluza*; sed ne timu, ĝi denove vizitos vin en *GA* 49. Kaj ni jam ekpretigas gigantan krucvortenigmon (dupaĝan) por celebri la 50an numeron.

La solvo de la pasinta numero kuŝas ĉi-sube.

La premiito estas nia nordafrika samideano Javier Romero, el Melilo. Gratulon! Baldaŭ vi ricevos la libropremion.





(Daŭrigo de la paĝo 16)

aliaj asocioj, legi *El Correo del Esperanto* kaj *Kajeroj de la Sudo* inter aliaj revuoj, aŭ ricevi Esperantajn literojn el la paĝaro de Flandra Esperanto-Ligo.

Ni intencas kreskigi la paĝaro tuĵtuĵe. Ekzemple, [delpozo@redestb.es](mailto:delpozo@redestb.es) kontaktis anglan samideanon kun la celo traduki lian perkorespondan (pli ĝuste, pere-poŝtan!) E-kurseton. Temas pri kurso pli moderna ol la Perkomputila Esperanto-Kurso disponebla de antaŭlonge, ĉar ĝi fakte enmetas ne nur gramatikaĵojn sed ankaŭ konitaĵojn pri la E-movado kaj -kulturo. Ĝi estis desegnita tiel, ke la studento povas legi ĝin dum konekto al la Interreto aŭ poste, sen tiu konekto, kaj ŝli povas sendi la ekzercojn per e-poŝto al sia tutoro, kiu per la sama rimedo respondos.

[joser@lander.es](mailto:joser@lander.es) dume planas la aperigon de dokumentoj pri la Arĥivo de AEU, kaj pri la historio de Esperanto. Ankaŭ aperos en nia paĝaro *Gazeto Andaluzia* kaj *Monate ĉe Vi*, sed pro la manko de kunlaborantoj ili povos aperi nur kelktempe post la papera eldono. Krome, iuj elektitaj artikoloj de pli malnovaj numeroj de ambaŭ revuoj daŭre legeblas per la Interreto.

Ambaŭ zorgantoj de la paĝaro de AEU petas de niaj geamikoj kunlaboron: se vi havas materialon hispanlingvan interesan por neesperantistoj,



bonvolu havigi ĝin al ni pere e-poŝto aŭ per diskedo; aŭ se temas pri esperantlingvaĵo kiu informas pri Andaluzio. Kion ni pleje bezonas estas grafisman materialon, kiu donu al nia paĝaro aspekton plej aktualan. Se vi povas helpi persone, aŭ povas havigi al ni materialon, aŭ havas amik(in)on kiu helpus nin, ne hezitu turnu vin al niaj e-poŝtaj adresoj.

Se vi havas *Interreto*-konekton vi jam povas viziti nin. Aŭ se vi konas amikon kiu ĝin

havas, informu lin pri nia URL (<http://www.redestb.es/personal/delpozo/>). Temas pri nova diskoniga servo de AEU.

Kion vi bezonas por uzi ĝin? Simple konekton al la *Interreto* kaj t.n. navig-programon, prefere *Netscape Navigator* aŭ *Microsoft Internet Explorer 3.0*. Ĉi tiuj programoj senpage haveblas ĉe multaj TTT-paĝaroj kaj ankaŭ en komputilaj revuoj.

SIZIFO



## Indekso de la jaro 1996

Ĉu vi ne memoras, kie estas tiu artikolo kiu interesis vin? Jen indekso kie vi povas trovi artikolon laŭ titolo kaŭ aŭtoro. La unua numero montras la revuo kie ĝi aperis, la dua montras la paĝon.

- 10 Sciindaj aspektoj pri Esperanto kaj Afriko, 47/17
- 10 sciindaj aspektoj pri Esperanto kaj la Kino, 45/17
- 10 sciindaj aspektoj pri Esperanto kaj la Sport, 46/17
- A. Marco Botella, 47/8
- Alvoko al Ĝenerala Asambleo, 47/22
- Analiza Skolo, 47/13
- Andaluza Kulturo, 48/17
- Andrés Martín, 45/16
- Beletra Konkurso (regularo), 45/10
- Dek jarojn post Ĉernobil, 46/11
- Deklaracio pri la Esenco de la Esperantismo, 46/malkovrilo
- Efika Esperantismo: 12, 45/3; 13, 46/3; 14, 47/3; 15, 48/3
- Ekua aŭ Eŭro, ĉu Zamenhof pravis?, 45/11
- Elektraj aŭtomobiloj, 48/13
- Esperanto Aplikata, 45/24, 46/23, 47/23, 48/23
- Esperanto-disko, 48/15
- Esperanto en la lernejo, 46/16
- Esperanto en la Sevila Foiro, 47/19
- Esperanto-Kulturo, 47/13
- Financa Raporto, 46/6
- Fondiĝo de la unua Andaluza Esperanto-Federacio, 48/19
- Giordano Moya, 45/3, 46/3, 47/3, 48/3
- Gonçalo Neves, 47/9
- Helpu per via letero al la prestiĝo de Esperanto, 46/14
- Historia arkivo de AEU, 45/18, 46/19, 47/19
- <http://www.redestb.es/personal/delpozo>, 48/16
- Il-tisa Skolo, 47/13
- Informe sobre el Esperanto 2.0b, 46/8
- Intervjuo al Luis Serrano, 45/5
- Intervjuo al Luz Vázquez, 46/5
- Intervjuo al Rafael Ruiz Criado, 48/5
- Intervjuo al Solo, 47/5
- J.M.R.H., 45/11, 45/17, 46/17, 48/13, 48/17
- Kiel ekestis la esprimo *krokodilo*?, 47/9
- Komikso *Samideano*, 46/7
- Koncerto de Solo, 47/5
- Konkludoj de la Konsilio pri lingva diverseco kaj plurlingveco en la Eŭropa Unio, 45/malkovrilo
- Krucvortenigmo, 45/12, 46/12, 47/20
- La decimala sistemo por mezuri la Spaco-Tempon, 46/10
- La lingvo en la hispana politiko, 45/22
- László Szilvási, 46/14
- Lingva Angulo, 45/16 (La akuzativo)
- Lirikaj Perloj de Al-Andalus*, 47/8
- Literatura Konkurso *Gazeto Andaluzia*, 47/11
- Loj, 47/7
- Ludoviko Oñer, 46/10



Luis Serrano, 45/22, 48/7  
 Marcos Cruz, 48/15  
 Niaj ĉarmaj eŭropaj parlamentanoj, 48/7  
 Paĝoj de nia Historio, 45/19 (Ĝibraltaro), 46/19, 48/19  
 Peticio de Unuigintaj Nacioj favore al Esperanto, 47/malkovrilo  
 Pledo por koreco, 47/7  
 Poezia Angulo, 45/15 (Manuel Alto-laguirre), 46/15 (Juan Rejano), 47/12 (Juan Ruiz Peña), 48/12 (Juan Ramón Jiménez)  
 Profiti la flugilojn de la favora vento, 47/21  
 Radioamatora Angulo, 45/20 (La polarizo), 46/20, 48/10 (la paket-

radio)  
 Radioamatora Stacio en la UK de Valencio 1993, 47/10  
 Recenzo: *365 Tagoj el la Biblio*, 48/9  
 Recenzo: *Lirikaj Perloj de Al-Andalus*, 47/8  
 Recenzo: *Rok-Gazet'*, 45/8  
 Recenzo: *Vinilkosmo-kompil'*, Vol.2, 48/8  
 Roberto Resende, 47/21  
 Sizifo, 45/8, 46/8, 47/7, 47/8, 48/15, 48/16  
 Stacio Esperanto, 45/20, 46/20, 47/10, 48/10  
 Traduka Konkurso: 48/11

## Esperanto Aplikata

Ĉi tie oni povus legi VIAN anoncon. SENPAGE. Aŭ tiun de viaj amikoj, najbaroj... Simple skribu leteron al ni, kaj via

① Verda Reto=kolekto de ĉinaj esperantistoj, ĉiuj aktivaj. Estas la unua fojo, kiu aperas adresaro de ĉinaj esperantistoj. En tiu adresaro ankaŭ troviĝas anoncetoj, por komercaj rilatoj kaj interŝanĝoj de varoj. La adresaro kaj pliaj informoj, dulingvaj (ĉina kaj Esperanto), haveblas kontraŭ tri usonaj dolaroj. Liu Xiaozhe, 32 North Youhano Road,

Urumqui, 830000 Ĉinio. Telefono (0991) 4841216-219.

● *Heroldo de Esperanto*. La plej populara sendependa internacia gazeto de la Esperanto-Movado. Granda formato, simila al tag-gazeto, vario de enpaĝigo; ofteco (16 numeroj jare); abundeco de informoj; specialaj numeroj pri la Universalaj Kongresoj kaj kalendaro de la Esperantaj kunvenoj kaj renkontiĝoj; sendependeco. Tutajara abono por 1997: 3350 pesetojn. Subtena abono (por livero de la gazeto al espe-rantistoj en



evoluantaj landoj), 6700 pesetojn. Aerpoŝta sendado, 7 guldenojn. Anoncetoj ĝis 25 vortoj: 1200 pesetojn. Hispana peranto: Luis Serrano Pérez, Font Nova 32, 08202 Sabadell (per poŝta ĝiro; se vi preferas pagi per ĉeko, aldonu 200 pesetojn por bankaj elspezoj).

● Radio-Elŝendoj satelitaj per via televidilo! Persatelitaj perfekte aŭdeblaj radioelŝendoj. Petu la programojn de POLA RADIO, Esperanto-Redakcio, PK 46, 00-977 Varsovio, Polio.

● Kvar Alzacaj Vinoj, selektitaj kaj etikeditaj en Esperanto. Philippe Gocker, vinkulturisto kaj diplomita enologo proponas al vi 4 famajn vinojn. 24, rue de Riquewihr, FR-68630 Mittelwihr, Francio. Tel. (33) 0389490123 ; fakso (33) 03 89490472.

● Tranoktado, seminariado en Elzacol Jam kelkcento da homoj, restadis en la seminariejon kaj gustumis alzacan vinon! Centre de Mittelwihr, 16 rue du Bouxhof, FR 68630 Mittelwihr. Tel. (33)

0389479309, fakso (33) 0389490225. Nepre kontaktu TAKE - LA DOMO.

● Bulgaran rozan buteron, t.e., krudmaterialon por priparfuma industrio; rozajn parfumaĵojn por donacetoj (30FF); tekstilajn fabrikaĵojn (jaketoj, littukoj, ktp). Kontaktu Marian G. Ivanov, obl. Burgaska 8630, v. Roza, Bulgario.

● Kiu deziras fari danĝeran vojaĝon kun tibetaj vilaĝanoj por pilgrimi al Lhasa? Mia tibeta amiko en Yunnan organizas tian pilgrimadon ĉiujare per sia ŝarĝaŭto por 1700 km. Kontaktu jam nun s-ron WANG Tianyi, Xi'an Esperanto-Asocio, Xiyinglu 74, CN-710054 Xi'an, Ĉinio. Tel. (86)293212171, fakso (86)297218042.

● Interŝanĝo de poŝtmarkoj. Juan Manuel Alonso de Arco, Alameda de Capuchinos 8, 5<sup>o</sup> B, 29014 Malago, Hispanio.

● En fama antikva urbo Samarkando, Uzbekio, aktivas e-istoj kiuj sperte peras internacian kunlaboron en







Esperanta Turismo-Servo aranĝas por vi hotelon, veturbiletojn, aĉetadon, ekskursojn kaj renkontiĝon kun e-istoj. Kontaktu antaŭ la vojaĝo al Japanio. ETS/Ooba Shigeko, 4-1-2 Higashinakano, Nakano-ku, Tokio 164, Japanio. Tel. 81-3-3364-4957. Faks. 81-3-3364-0504.

①⑥ Sonorilego por preĝejo. 700USD/35kg, 1000USD/60kg, 130USD/100kg. S-ro Karajani Shpk, RR Abdi Top-tani, Nr 2, Tirana, Albanio. Fakso: 355-42-23972.


①⑦ Novtipa fulmogardilo

*Informe sobre el Esperanto 2.* Hispanlingva programo pri Esperanto. Haveblas en 2 versioj: provversio (1 disko), kontraŭ 300 ptoj (poŝtstampoj) aŭ sendante diskon kaj ŝtampitan koverton; versio kompleta (5 diskoj) kontraŭ 2000 ptoj (per antaŭpago) aŭ 2000 ptoj + sendokostoj. Ambaŭ versioj ebligas aŭskulti esperantajn vortojn kaj muzikaĵo(j)n (kompreneble pli da ili en la versio kompleta). Perfekta por viaj neesperantistaj geamikoj. J. F. Martín del Pozo, Poŝtkesto 5184, 29080 Malago, Hispanio.

Y5-serio, por elektra ekipaĵoj de alterna kurento je 3.8~12.7 KV, 3.8~69KV, 12.7~216 KV. Ili estas vaste uzitaj por transformatoroj, k.t.p. Se, ĉe vi estas necese por fondi tian fabrikan, la ĉina deziras investi. Detalaj informoj ĉe BEK, Xi'an Esperanto-Asocio, Xiyinglu 74, CN-710054 Xi'an, Ĉinio. Tel: 86-29-3212171. Fakso: 86-29-7218042.

①⑧ Ultraruĝa termoskopo Y-5a, je longa distanco 100m al punkto  $\varnothing 20\text{mm}$  dum  $-30^{\circ}\sim 400^{\circ}\text{C}$ ,  $\pm 1\%$ ,  $\pm 1^{\circ}\text{C}$ . 2999USD/pc FOB Ĉinio (la prezo egalas nun 20% de samaj termoskopoj en internacia merkato). BEK, Xi'an Esperanto-Asocio, Xiyinglu 74, CN-710054 Xi'an, Ĉinio. Tel: 86-29-3212171. Fakso: 86-29-7218042.

①⑨ Ĉiumonate la Komerckaj Industrioĉambro de Colmar kaj Centra Alzaco (Francio) eldonas liston de ne-okupitaj ejoj, kiun ĝi disponigas senpage. Ekde la fino de januaro 1996, tiu listo kun pli ol 200 adresoj estas konsultebla pere de Internet en Esperanto. <http://www.rmcnet.fr/ccl>



AŮSTRIA

RADIO

INTERNACIA

## ESPERANTO, UNIVERSALA LINGVO

Oni povas esperi, kiel Zamenhof esperis, ke tiu lingvo finfine estos akceptata de la tuta homaro. Estas nekomprenoble, ke Esperanto restu forgesita de la intelektuloj, tial ke ĝi estas bone planita lingvo kaj taŭga komunikilo.

La plejmulto de la verkistoj kaj sciencistoj sin decidis favore al la angla aŭ al plurlingvismo, rifuzante Esperanton. Ŝajnas, ke ili konsideras Esperanton kiel lingvon por nekleruloj. Oni povas kompreni tiun rifuzon, nur pro la aroganteco aspekti kiel eruditaj personoj. Kelkaj akceptus kompleze Esperanton, sed la tradicio aŭ la rutino estis tre forta je la komenco de ilia profesia vivo.

Akcepti la anglan kiel internacian lingvon, estas submetiĝi al lingva imperialismo; estas maljusta privilegio por la ŝtatoj kie regas la angla. La intelektuloj rajtas ne rezigni la anglan; tamen ili devus helpi por ke nia neŭtrala kaj bone planita lingvo eniru en la lernejojn. La lernantoj devus havi nociojn pri ambaŭ lingvoj.

Persisti pri plurlingvismo estas la plej malbona solvo, ĉar devigas al la studentoj eksterordinaran klopodadon, kiun oni povus dediĉi al aliaj temoj. Krome, sciante tri aŭ kvar lingvojn, oni ankaŭ restas sen komunikado kun la plej granda monda parto; cetere, estus konflikto determini kiaj lingvoj devas esti lernotaj.

Resume, estus gravege enkonduki Esperanton en la lernejojn, kaj atendi 4-5 jarojn por rikolti la fruktojn de tiu instruado. Oni devas konsideri, ke Esperanto estas ok- aŭ dekoble pli facila ol nacia lingvo, kaj la fonetiko kaj la gramatiko estas senpene atingeblaj. Pro tiaj kvalitoj kaj tia neŭtraleco, Esperanto estas la plej taŭga lingvo por la internacia komunikado.

La komunikado, por la homaro, estas problemo tiel grava, ke malpermesi Esperanton ĉe la lernejoj estas ofendo al la esperantistoj; multaj el ili estas universitatanoj kaj kelkaj estas profesoroj de universitato.

(El la Politika Projekto de TUTMONDE por Nova Ordo Tutmonda)

---

TUTMONDE estas internacia Pacifista Movado. Ĝia Ĝenerala Sekretario nomiĝas Albert Stephan. Por kontakti tiun organizon en Hispanio turnu vin al: Tutmonde, Apartado 313, 08220 TERRASSA (Barcelona).